Vol. VII — Majo 1929 — N°

# l'Esperantista Vivo

PUBLIKIGATA DE GRUPO ESPERANTISTA DE SCLESSIN-OUGRÉE

*Aperas 1. kaj 15. de ĉiu monato.*

TARIFO DE ABONOJ :

Por membroj de Grupo de Sclessin-Ougrée . . . . . . . . . . Fr. ..................

Por aliaj personoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. ..................

*Oni pagu al poŝtĉekkonto No 107.192 de Sro J. BISSOT de Sclessin. rue de Trazegnies, 72.*

**Redaktejo : René DECHESNE, rue du Progrès, 133, Ougrée.**

## Grava avizo k. invito.

## Ĉu ni havos Esperanto-kongreson en Liège en 1930?

Gesamideanoj, la momento estas grava, gravega eĉ. Malofta okazo prezentiĝas al ni por fari tre efikan propagandon por nia movado.

La nacia kongreso de venonta jaro okazonte en Valonujo, ni proponis al la estraro de Belga Ligo la aranĝon de tiu kongreso en Liège, kiu estis precize elektita kiel ejo por la Internacia Ekspozicio de 1930, kaj kie troviĝos multnombraj vizitantoj el ĉiuj partoj de nia kaj aliaj landoj.

La ideo plaĉis al la Komitato,

POR VIA POŜLAMPO, UZU LA BATERION

" HELLESENS „

kiu petis ke ni esploru iom detale, kiel eble plej baldaŭ, la eblecon efektivigi tiun projekton.

Tial, laŭ instigo de nia parolportanto ĉe la Ligo, S-ro Jos Hérion, prezidanto de Verviers'a Grupo, ni aranĝis por la lundo 13a de majo kunvenon, kiun ĉeestos nia dirita peranto kaj al kiu ni varme invitas ĉiujn niajn amikojn, kiuj havas interesajn ideojn pri tiu afero, kiuj povus ien helpi por la organizado de la kongreso mem, aŭ kiuj nur aprobus nian proponon.

Ni esperas ke vi ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, komprenos la gravecon de la projektita provo, kaj ke vi volonte estos kun ni por diskuti kaj prepare studi la demandon.

Bone notu, ke la kunveno okazos <u>lundon, 13an de majo, je 7a horo</u> vespere, <u>ĉe nia Sekretario, S-ano René Dechesne, rue Ernest Solvay, 1, Sclessin</u> (antaŭa establo Buray) ĉe la haltejo "Pont d'Ougrée" de "verda" tramo (tramo de Seraing).

Ĉi sube vi trovos la programon de nia nunjara kongreso, kiu okazos en Gand la 18-20an de majo kaj ĉe kiu tre verŝajne estos fiksita la loko de

POR LA T. S. F., UZU LA BATERION

" HELLESENS „



la kongreso de venonta jaro.

Nur tio montras la urĝecon de la demando, kaj tial ni esperas vian ŝatatan ĉeeston ĉe la kunveno.

Do, ke ĉiu, kiu povos veni, venu!

---

18a Belga Esperanto-Kongreso.
Gand 18-20. majo 1929.

Provizora Programo.

<u>Sabaton 18an.</u>
17a h.: Malfermo de la akceptejo en "Salonego Concordia", placo Lippens (Rond Point)
18a h.: Intima kunveno.
20a h.: Ĝenerala labora kunsido

<u>Dimanĉon 19an.</u>
9a h.: Kunveno de la kongresanoj en akceptejo.
10a h.: Oficiala akcepto en la urbdomo.
10½a h.: Ĝenerala kunsido de "Belga Ligo Esperantista"
13a h.: Fotografado de la kongresanoj.
13½a h.: Festeno en "Hôtel Helder"
17a h.: Vizito de la urbo
20a h.: Intima festo kun balo.

<u>Lundon 20an.</u>
Detala vizito de la urbo kaj promenado en la ĉirkaŭaĵo.

Vidu aliajn informojn sur sekvanta paĝo.

POR VIAJ SONORILOJ, UZU LA BATERION

" HELLESENS „

La kongreskarto kostas fr. 10.–

La festeno fr. 25.– (sen vino), ĉiuj taksoj entenataj!

Hotelĉambrojn oni povas rezervigi al si po ĉirkaŭ fr. 10.– 15.– 20.– k.t.p. po persono. Du personoj dormantaj en la sama lito ricevonte rabaton, estas konsilata ke amikoj dormu duope.

Oni antaŭpagu al la ĉekkonto n° 133767 de Belga Ligo Esperantista nur la kongreskarton kaj la festenon. La ĉambrojn oni pagu en la hotelo mem.

<u>Fervoja rabato.</u>– La necesa petskribo estis farita por ke la kongresanoj ricevu rabaton de 35% je la ordinara prezo de la vojaĝbiletoj, vojaĝante ĉu grupe ĉu izole?

---

## Ĉe niaj Bruselaj amikoj.

### Programo por Majo.

<u>Lundon 6an:</u> Raporto pri la vizito ĉe Philips

<u>Lundon 13an:</u> Lastaj sciigoj pri la kongreso. Ripetado de la kantoj por la kongreso.

<u>Sabaton 18. Dimanĉon 19 Lundon 20</u> – Kongreso en Gand.

<u>Lundon 27an</u> – Generala kunveno.– Raporto pri la kongreso.

**"HELLESENS"**

UNIVERSE KONATAJ

Vol. VIIa — 1an de Junio 1929 — No 11a

# l'Esperantista Vivo

**PUBLIKIGATA DE GRUPO ESPERANTISTA DE SCLESSIN-OUGRÉE**

*Aperas 1. kaj 15. de ĉiu monato.*

TARIFO DE ABONOJ :

Por membroj de Grupo de Sclessin-Ougrée . . . . . . . . . . . . Fr. 6.50

Por aliaj personoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. ........

*Oni pagu al poŝtĉekkonto No 107.192 de Sro J. BISSOT de Sclessin, rue de Trazegnies, 72.*

**Redaktejo : René DECHESNE,** ~~rue du Progrès, 135, Ougrée.~~ rue Ernest Solvay, 1, Sclessin

## Urĝa avizo al niaj membroj.-

### Por nia kongreso en 1930.

Male de tio, kion ni antaŭdiris en nia lasta numero, la propono koncernanta aranĝon en Liège de la XIXa Belga Kongreso ne estos oficiale prezentata ĉe la Liga Ĝenerala kunveno.

Tamen la afero estis ankoraŭ priparolita kun kelkaj Ligestroj, kaj rezultis el la diskuto, ke nia grupo — kiel ni jam sciis — devas nepre esti membro de Belga Ligo Esperantista por rajti esti komisiata aranĝi Ligan kongreson. Por ke nia grupo estu B.L.E.-ano, la nura kondiĉo estas, ke niaj membroj estu abonantoj de "Belga Esperantisto", monata oficiala organo de la Ligo. Pri tio.

**POR VIA POŜLAMPO, UZU LA BATERION**

**" HELLESENS „**

ni havas jenan bonegan informon komunikotan al niaj grupanoj: la abono nur kostos dekdu (12) frankojn anstataŭ dudek (20), kiujn oni devus pagi, se oni estus sola por aboni.

Sekve de la deziro esprimita de la Ligestraro, ni do petas, ke niaj membroj, kiuj konsentas aboni la revuon "Belga Esperantisto" kaj tiel montri sian aprobon kaj apogon koncerne nian proponon pri Belga Kongreso en Liège, bonvolu tuj konigi sin ĉu al nia Prezidanto, S-ro Jules Bissot, rue de Trazegnies, 72, Sclessin, ĉu al nia Sekretario, S-ro René Dechesne, rue Ernest Solvay, 1, Sclessin (telefono: Liège 6477). Tiuj, kiuj enskribiĝos sin, bonvolu ankaŭ ricevigi al ni la necesan monon (t.e. 12 frk) ĉu samtempe ĉu poste sed kiel eble plej baldaŭ. Por la pagoj, oni povas uzi poŝtĉekkonton Nr 107.192 de S-ro Bissot.

Ni jam havis la okazon rimarkigi la multajn kvalitojn de "Belga Esperantisto" kaj la gravajn avantaĝojn, kiujn oni akiras abonante ĝin. Ni ne reparolos detale pri tio kaj nur memorigos, ke la revuo redaktita en bonega Esperanto enhavas tre grandan parton literaturan tiom prozan kiom poezian, tre interesajn teknik-art- k.a. artikolojn, tre spritajn humoraĵojn, detalan

POR LA T. S. F., UZU LA BATERION
" HELLESENS „



kronikon de l' Esperanto-movado en nia lando kaj eksterlande, k.c.. Tiu ĵurnalo povas do ege utili kiel bona leg- kaj perfektig-materialo, kaj ankaŭ kiel taŭga informilo, malgraŭ apero iom prokrasta. Plie ĝia prezo vere escepta nun obligas ĉiun mendi abonon.

Tial ni esperas, ke multaj el vi jese respondos al nia alvoko kaj akceptos eniri la agantan grupon de la Ekspozicia Kongreso abonante "Belgan Esperantiston".

Aliaparte ni petas, ke vi bonvolu fari la necesaĵon kiel eble plej frue por ke ni povu baldaŭ starigi la definitivan liston, kiun atendas la Ligestraro por kunvoki en Liège, post 2 aŭ 3 semajnoj, kunvenon celantan la preparajn aranĝojn por la kongreso.

Ni cetere esperas, ke ni jam povos esti pretaj por anonci en nia numero de 15. de junio la detalojn pri la dirita kunveno. Sed tio kompreneble multe dependas de vi; estus dezirinde, ke vi enskribigu vin tuj post ricevo de jena numero.

Do tuj pristudu la aferon kaj senprokraste komuniku al ni vian decidon.

## Eĥoj pri nia XVIII a kongreso en Gand.

La kongreso, kiu okazis en Gand dum

POR VIAJ SONORILOJ, UZU LA BATERION
" HELLESENS „

la Pentekostaj festotagoj, trafis belan sukceson.

Raporti detale pri la tieaj okazintaĵoj estus certe malfacila tasko kaj ne estus konforma al nia programo, kiu enhavas nur resuman protokolon pri la ĉefaj okazintaĵoj. Cetere oni povos facile kompreni tion, kio estis la kongreso, konsiderante ĝian tagordon de kiu oni neniel deflankiĝis.

Ni nur sciigu ke:

La atmosfero estis tre favora por ke la kongreso okazu en plej bonaj kondiĉoj.

La Orkestro, kiu akceptis la kongresanojn kaj ankaŭ ĉeestis ĉe la festeno, havis tre kuraĝigajn vortojn.

Laŭ la nombro de la kongresistoj (ili estis 181-opaj), tiu ĉi estas la plej imponaj el ĉiuj postmilitaj belgaj kongresoj.

Krom Belgujo, estis reprezentataj ĉe la kongreso: Francujo, Nederlando, Rumanujo, Polujo, Bulgarujo kaj Hindujo.

---

## Indulgemigaj cirkonstancoj.

— Juĝisto: "Vi estas punita jam kelkfoje?"
Akuzito: "Jes, sed oni deklaris min ankaŭ ofte senkulpa."

K.E.S17.

" HELLESENS „

UNIVERSE KONATAJ